



# Boletín

n° 407 Julio - Septiembre 2014



# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
Aperanta de 1949  
Numero 407

Redakto-skipo  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos López

Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7  
ES-28015 Madrid  
admin@esperanto.es  
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961

Poŝtelefono: +34 638 547 104  
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

### Estraro

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio  
**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López  
**Sekretario:** Félix M. Jiménez  
**Kasisto.** Raúl Mtnez. Anguita  
**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor  
Juan José Vera  
Jesús García Cano

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012

# Salutvortoj

Finiĝis por multaj el ni la someraj ferioj, kaj alvenis nova kurso, labora kaj akademia. Somero estis plena je okazaĵoj en nia Esperantujo, kiel tradicie. Universala Kongreso kaj Konferenco de ILEI unuafoje en hispanparolanta Sudameriko. Eŭropa Kongreso en Centra Eŭropo. Kongreso de SAT kun alta kvanto da partoprenantoj de aktivuloj el Hispanio. Pri ĉiuj ĉi aranĝoj kaj multo alia vi legos en tiu ĉi numero.

Por Hispana Esperanto-Federacio estas speciale atentiginde ke fine, post multaj klopodoj, oni aprobis la kreadon de hispana sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ĝi estas la kulmino de niaj provoj antaŭenigi kaj plibonigi la instruadon de la internacia lingvo en nia lando, al kiu ni dediĉis tioman tempon en la lasta hispana kongreso en Arundo, interalie per la kreado de la instruista sekcio de nia asocio.

Ni esperas ke ankaŭ por tiu ĉi celo kontribuos la ĉeesto, eksterordinara en nia historio, de studentoj el Hispanio en la interlingvistikaj studoj en Poznano. La helpoj de diversaj volontuloj kaj asocioj ebligas la fakiĝon de tri junaj kaj entuziasmaj esperantistoj, kiuj certe havos la okazon altigi la nivelon de la esperantismo en nia duoninsulo, ankaŭ el scienca vidpunkto.

Nun, en septembro kaj oktobro, kutime komenciĝas novaj kursoj, venas novaj lernantoj. Ne estas superflue elstari kiom gravas la instruado en la disvolvigo de nia lingvo. Se ni volas ke Esperanto ne restu nur marĝena grupeto de amikoj, ni bezonas novajn parolantojn, kun bona lingva nivelo kaj kono de nia komunumo. La penadon kaj la laboremon de niaj instruantoj, preskaŭ ĉiam volontuloj, apenaŭ eblas troigi.

Bonan ŝancon al ili, kaj bonvenon al ĉiuj novaj lernantoj. Se HEF povas vin iel helpi, ni ĉiuj troviĝos ĉiam je via servo.

*José Antonio del Barrio  
Prezidanto de HEF*

# Enhavo

Salutvortoj	1
Fundación Esperanto	3
Esperanto en Maroko	5
Pri Grupoj kaj Asocioj	6
Temoj pri HEF kaj aliaj	8
Aliĝo al UEA utilas kaj helpas	12
Interlingvistikaj studoj en Poznano	13
Paĝoj pri Beletro	16
Miaj impresoj en la UK de Bonaero	18
Esperanto en la Kultura vivo de Madrido	21
Hispanoj en Esperantujo: 87a SAT Kongreso kaj 18a E-Renkontigoj...	24
La 47-a ILEI Konferenco en Montevideo	27
10-a Eŭropa Esperanto-Kongreso	30
Vinilkosmo ofertas magian muzikon	32

---

## GRATULDEZIROJ

La antaŭa prezidanto de HEF, Pedro Hernández, edziĝis la sabaton 24-an de majo, kun Balogi, el Bocvano.

La 23-an de aŭgusto edziĝis nia kasisto, Raúl Martínez Anguita, kun Julie, el Francio. En ambaŭ kazoj akompanis la festantojn kelkaj esperantistaj amikoj.

La prezidanto de HEJS kaj estrarano de HEF, Jesús García Cano, patriĝis. La novnaskito nomiĝas Aitana kaj bone alvenis en la mondon.

Ili ĉiuj ricevu nian plej koran gratulon nome de ĉiuj hispanaj esperantistoj!

La 74-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en la provinco de Valencio, en Cullera, en la unua semajnfino de majo. En venonta numero de Boletín ni informos pri la detaloj. Sed dume, rezervu la datojn, kaj pretigu vin por la festo de la hispana esperantistaro.

## HELPOJ DE *FUNDACIÓN ESPERANTO*

Por la nuna jaro 2014 komence ni skizis tre malgrandan buĝeton pri monhelpoj.

Tamen, alvenis al ni neatendita mono, kvazaŭ "el la ĉielo" (rilate al la iama eldono de la libro "La Kosmo kaj Ni" de D. Galadí kaj A. Wandel, dum la tempo kiam direktoro de la fondaĵo estis bonfarulo José María Rodríguez).

Tial, la situacio povus prezentiĝi pli favora.

Dum la Kongreso(j) en Arundo, Katalin Kováts (respondeculino pri "[edukado.net](http://edukado.net)") atentigis ke universitata kurso pri (kaj por) Esperanto en Poznano (Pollando) ne funkcios se ne aliĝos studentoj. Kaj tio estus bedaŭrinda afero por Esperanto ĉar oni multe devis peni por ke tiu projekto aperu. Oni komentis ke estus interese klopodi helpi al eventualaj interesatoj kiuj poste povus kunlabori al progreso de esperanta instruado.

Tial, ni anoncis la eblon helpi tiucele. Krome, ni ricevis alian peton koncerne al disvastigo de Esperanto.

Kaj, kvankam la ĝenerala kriterio estas pagi al grupoj nur pro aktivaĵoj jam farita, ĉi-foje ni konsideris fari escepton (sen ke ĝi starigu precedenton).

Sekve, en aŭgusto ni pagis la jenajn helpojn:

Por partopreno en E-kurso en Poznano (Pollando): al Suso Moinhos: 500 €

Por disvastigo kaj instruado de Esperanto: al Enric Baltasar (de Valencia Esperanto-Asocio): 300 €.

Ni memorigas, ke ankoraŭ eblas fari petojn (ĝis la 30a de novembro de 2014, kiel limdato) pri kiuj ni decidis (principe, kiel kutime) en decembro.

Lorenzo Noguero  
Sekretario de F. Esperanto



FUNDACIÓN  
ESPERANTO

# MODIFO DE PATRONARO ĈE FUNDA- CIÓN ESPERANTO

En kunsido datumita la 3an de junio 2014 okazis modifo de la patronaro de Fondaĵo Esperanto.

Emilio Pérez rezignis pro problemoj de sano.

La nova patrono estas Enrique Navarro, membro de HEF kaj de UEA.

La esperanta movado kaj la esperantaj organizoj funkcias danke al la agado de volontuloj.

Ni profitas nun por danki ilian agadon kaj helpemon. DANKON al ambaŭ!

Tiel, la aktuala patronaro konsistas el: Antonio Marco (Prezidanto), Lorenzo Noguero (Sekretario), Jaime Benito kaj Enrique Navarro.

Oni formaligis la rezignon kaj la akcepton en la protektorato (oficejo en la aragona registaro).

Oni profitis por fari foton. Tie aperas Emilio (maldekstre) kaj Enrique (dekstre).

Krome, ni memorigas ke oni povas sendi proponojn kaj petojn pri helpoj ĝis la fino de novembro.

Alia komunikilo: Pri bankaj kontoj oni decidis simpligi por malaltigi la elspezojn.

Tial, nun F. Esperanto havas konton nur en banko CaixaBank (antaŭa "La Caixa").

Nome: 2100 5553 36 2100406825.

*Lorenzo Noguero*

*(Sekretario de F. Esperanto)*



# ESPERANTO EN MAROKO

Eble la plimulto de la esperantistaro tute ne scias pri la ekzisto de ia esperanta semo en la proksima suda lando de Maroko. Kutime la hispanaj esperantistoj rigardas al la aliaj landoj de Eŭropo por trovi esperantajn geamikojn aŭ por plani esperantajn vojaĝojn, kaj normale ili tute malkonas kaj eĉ ne pripensas pri la ebla ekzisto de esperantistoj en la najbara lando Maroko. Ĉu tie iu interesiĝas pri la internacia lingvo?

Eble la plej bona demando estus ĉu iu zorgis diskonigi la ekziston de Esperanto en Maroko? En la menso de ĉiuj, Maroko restas kiel malriĉa lando tute ekster la ebla interesiĝo pri la lingvoj aŭ pri la interkomunikado. Jen granda eraro.

La marokanoj karakteriziĝas pro sia lerteco en la lernado de lingvoj, sia komerca sprito kaj sia deziro de malfermiĝo al la tuta mondo. Se esperanto ne estas pli viva en Maroko estas simple nur kaŭze de la malkono pri la ekzisto mem de la lingvo internacia.

Maroko havas du naciajn lingvojn, la araban kaj la berberan, sed ankaŭ oni lernas precipe la francan, kaj en dua ordo la anglan kaj la hispanan por la internacia komunikado. La marokanoj estas amantoj de interreto kaj la rapida komunikado per eta mesaĝetoj en poŝtelefonoj. Maroko estas lando juna kiu emas koni aliajn kulturojn kaj precipe vojaĝi, do kiam oni parolas pri esperanto al marokanoj, pri la facileco de la lingvo internacia, la interkompreno, la Kongresoj, la vojaĝŝanĝoj kiun donas la lingvo, kutime ekbrulas en iliaj koroj la deziro lerni esperanton kiel eble plej rapide.

Mia sperto kiel instruisto de Esperanto en Maroko ne estas tro longa, fakte estas sperteto kun du konatuloj al kiuj mi parolis pri miaj spertoj kaj mia rilato kun la lingvo internacia, ili baldaŭ interesiĝis pri la afero, kaj mi volonte ekinstruis al ili kelkajn fundamentajn gramatikaĵojn kaj ekparolis kun ili.

Estis vere nekredeble kiel rapide ili prenis la tutan gramatikon kaj petis kaj demandis al mi pli da vortoj kaj esprimoj, bedaŭrinde tio okazis dum miaj lastaj tagoj en Maroko kaj mi tute ne povis pro manko de tempo kaj de taŭgaj materialoj helpi pli en la instruado de nia bela lingvo, do mi proponis ilin aliĝi al la paĝaro de *lernu*, kie eble ili povus daŭrigi aŭtonome sian lernadon.

Estas do, nur eta verda gutto en oceano, sed se aliaj esperantistoj vere kontaktos kaj interesiĝos pri Maroko aŭ aliaj proksimaj landoj ekster Eŭropo por informi pri la lingvo internacia kaj iliaj ebloj, mi opinias ke ĝi estos vera fruktodona ago por la disvastiĝo kaj riĉiĝo de nia lingvo en landoj plenplenaj je junuloj scivolemaj, kiuj volas malfermiĝi al la mondo, kies plej bona ŝlosilo estas Esperanto.

Fabián Jiménez.




# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## Aragono

### PRI ŜEVĈENKO EN ZARAGOZO

En E-Grupo "Frateco", la 22an de julio, okazis kunsido dediĉita al ukraina poeto Taras Ŝevĉenko.



Enrique Navarro, Sekretario de la asocio alportis librojn en Esperanto ricevitajn el Ukraino danke al lia amiko Volodimir Pacjurko.

Taras Ŝevĉenko (1814 – 1861) estis ukraina poeto, kaj ankaŭ pentristo. Liaj literaturaj verkoj estas ofte konsiderataj kiel la fondo de moderna ukraina literaturo, kaj iuparte de la moderna ukraina lingvo. Li ankaŭ verkis ruslingve, kaj faris multajn majstrajn pentraĵojn.

Unu tre fama poemo estas "Testamento", kiu havis kaj plu havas grandan influon al la ukraina kulturo. Ĝi estis tradukita al pli ol 150 lingvoj (estas konataj pli ol ok esperantaj) kaj ĝi fariĝis bazo por multaj muzikaĵoj.

Oni komentis ke en Hispanio apenaŭ ekzistas libroj de aŭ pri tiu poeto.

Kurioze, en la "bitoteko" de Hispana Esperanto-Federacio aperas iama artikolo kun la poemo "La Testamento" (esperante kaj hispane).

Oni parolis pri la komplika vivo de T. Ŝevĉenko okaze de la 200-jara datreveno de lia naskiĝo.

Fine, oni legis kelkajn versojn en Esperanto omaĝe al li kaj al la ukrainaj samideanoj.

Certe vortoj estas fortoj: "Nia kanto pereos neniam".

Lorenzo Noguero  
Prezidanto de "Frateco"

## Andaluzio

Lastatempe, membroj de nia Asocio AEU, ofte partoprenas kongresojn naciajn kaj internaciajn. La lasta estis Bonaero. Tio helpas nin, ĉar en tiuj kongresoj ni havas la eblecon konatiĝi kun aliaj asocioj por interŝanĝi spertojn kaj malkovri metodojn pri la rekta instruado por novaj gelernantoj. La estraro de nia Asocio jam pripensas pri la venonta Andaluzia Kongreso, kiu povus okazi aŭ en Jerezo aŭ Kordovo. Pri la afero kaj pro la pozitiva sperto de la Nacia Kongreso de Arundo kune kun la Andaluzia, ni studas la plej taŭgan por baldaŭ anonci kie ĝi okazos.

## Eŭskio

### ESPERANTO-GRUPO DE BILBAO

La 23-an de majo estis elektita nova estraro dum la Ĝenerala Kunsido de la E-Grupo de Bilbao. La novaj estraranoj estas:

Prezidanto: Francisco López López.

Sekretario: Jesús M. García Iturrioz

Kasistino: Iciar Arteche Urrutia.

Voĉdonantoj: Teodoro Ibáñez Martín

José Pérez-Salado Kamps

Eduardo Larrouy López



Alie, kiel anoncite, la pasintan 24-an de majo, ni okazigis komunan manĝon en restoracio de Portugaleto por festi la “naskiĝtagon” de la E-Grupo de Bilbao: la 20-an de majo ĝi iĝis 108-jara, do unu el la plej aĝaj en la tuta mondo.

Bedaŭrinde, ne multaj homoj emis atenti pri nia alvoko kaj ĉi-jare nur kvin ĉeestis la okazintaĵon.

Spite de tio, kiel kutime, estis ege agrabla etoso kaj ni ĉiuj bedaŭris la alvenon de adiaŭa horo.

## Tenerifo

Esperantista Societo de Tenerifo elpretigas okazaĵojn pro la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Régulo Pérez, interalie fondinto de la klubo. En la lasta duono de oktobro prof. A. Leandro Trujillo Casañas prelegos pri lia vivo kaj agado kaj ESTO publikigos la reeldonon de la libreto “De una adopción y un homenaje”, kiu aperis en 1984 okaze de la omaĝo al Don Juan kiel “Hijo Adoptivo” de La Laguna. Krome, en Garafia (La Palma), la Urbodomo muntos fine de septembro ekspozicion pri Don Juan kaj Esperanto, en kies pretigado ESTO kunlaboras.



# TEMOJ PRI HEF KAJ ALIAJ

## JAPANA ESPERANTISTINO TRAIRIS LA JAKOBAN VOJON

La japana esperantisto Taeko Osioka, tre aktiva en la pac-movado de sia urbo Hiroŝimo, vizitis Hispanion en junio kaj julio por sekvi la Pilgriman Vojon de Sankta Jakobo. Ŝi alvenis la 3-an de junio, frumatene, kaj el la madrida flughaveno vojaĝis aŭtobuse al Pireneoj, por tie komenci sian itineron.



Sur la Vojo ŝi renkontiĝis kun esperantistoj el Pamplono, Burgoso kaj Leono. Post la fino ŝi vojaĝis al Madrido, kie ŝi faris prelegon en la loka klubo pri siaj spertoj kaj sia urbo Hiroŝimo, la 21-an de julio. Ŝi ankaŭ rendezuis dum tiuj tagoj kun la lokaj esperantistoj. En la apuda foto vi povas vidi unu el tiuj renkontoj, kie ankaŭ akompanis ŝin ankaŭ Ángel Arquillos kaj Mariló, el Malago, survoje al la Universala Kongreso en Bonaero.

## KREITA LA HISPANA SEKCIO DE ILEI

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj aprobis en sia Konferenco, celebrata dum monato julio en Montevideo (Urugvajo), la kreadon de la hispana sekcio de ILEI.

Temas pri la kulmino de la penoj entreprenitaj de Hispana Esperanto-Federacio dum la lasta jaro por kunordigi la aktivadojn pri instruado de Esperanto en nia lando, kaj kiu ricevis fortan elanon danke al la okazigo, ene de la Hispana Esperanto-Kongreso en Arundo, de la 1-a Hispana Konferenco pri la Instruado de Esperanto.


HEF daŭrigos tiun ĉi laboron por kunlaborado, kaj alvokas la instruistojn de Esperanto en nia lando, kaj aliajn homojn interesitajn en la edukado kaj la agnosko de la kursoj de nia lingvo, kunlabori kun la ĵus kreita sekcio pri instruado en la sino de la Federacio. Bv. skribi por tio al [retadreso@esperanto.es](mailto:retadreso@esperanto.es). En paĝo 27 vi povas legi interesan raporton verkita de Liba Galda, kiu ĉeestis la 47-an ILEI Konferenco en Montevideo.

# FESTADO DE LA NASKIĜO DE ESPERANTO



La sabaton, 26-an de julio, Hispana Esperanto-Federacio kunmemoris la datrevenon de la apero de la Unua Libro per kultura kaj babila renkonto en la sidejo kaj per komuna pikniko en la Parque del Oeste de Madrido, ĉe la Monumento al Miguel Hernández. Partoprenis ĝin kelkaj esperantistoj loĝantaj en Madrido kaj ankaŭ akompanis nin juna italiano Olivjero, el Pizo, kaj Dennis Keefe, usondevena aktivulo, kiu loĝis antaŭ pli ol dudek jaroj en Madrido, kaj ĝis antaŭnelonge en Ĉinio, kaj kiu vizitis Hispanion dum tiu monato julio.

HEF lanĉis gazetarkomunikon, reliefigante la noción "Lingva justeco", laŭ kampanjo entreprenita de UEA. La novaĵon ĉhis kelkaj retaj komunikiloj en Hispanio, kiel "Tercera Información", "El porvenir de Castilla-La Mancha" aŭ "Xornal de Galicia". La prezidanto de HEF estis krome intervjuita de la loka radio "Radio Canet".



## FUNEBRO PRO LA FORPASO DE AKTORO ÁLEX ANGULO

En julio forpasis pro trafikakcidento la konata aktoro Alex Angulo, ĉefrolulo de "La pedalaŭto", kie li rolis kiel instruisto de Esperanto.

Hispana Esperanto-Federacio, kiu kunlaboris kun li en la filmado, kondolencas al ĉiuj liaj familianoj, amikoj kaj admirantoj.

# ESPERANTA BIERO

En Toledo, ligita al anarkiismaj rondoj, kreiĝis kooperativo de bierfarantoj nomata "Speranto". Unu el iliaj bieroj nomiĝas "Zamenhof", kaj ĝi estis prezentita meze de majo en librejo "La libre de barrio" en Leganés. Ilia tritikbiero nomiĝas "Blanka Tigro" (tiel, en Esperanto!)  
Pliaj informoj: <https://www.facebook.com/bassbeer1>.



**BLANKA TIGRO**

WEIZENBIER  
CERVEZA DE TRIGO  
ARTESANAL  
Natural gusto.

INGREDIENTES:  
MALTA DE CEBADA PILSEN Y MUNICH.  
MALTA DE TRIGO, LUPULO HALLERTAUER  
TRADITION, LEVADURA Y AGUA  
TEMPERATURA: 6° C APROX  
IBUS: 13  
COLOR: 4 EBC  
VASO ACONSEJADO:  
MARIDAJE: TU MEJOR GENTE

Elaborado en Toledo por CERVEZAS ESPERANTO  
en las instalaciones de DAVIYON S.L.

5,3% ALC.  
500L

CERVEZAS ESPERANTO

¡Síguenos en Facebook! TEL DE CONTACTO: 686 265 274

CERVEZAS ESPERANTO PRESENTADAMENTE ANTES DE CADA UNO DE NUESTROS BIEROS EN NUESTRO

# ESPERANTO EN LA ARAGONA LINGVO

Ene de la programo de plurlingvigo de la retejo de Hispana Esperanto-Federacio, estis publikigita dum la somero la versio de diversaj paĝoj en la aragona lingvo. Ili estas viziteblaj en la adreso: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/ara-presentazion>

# ESPERANTO EN TELEVIDA SERIO

La fama televida serio "El secreto de Puente Viejo", elsendata dum ĉiuj vesperoj en la hispana televida stacio Antena3, montris dum aŭgusto kaj septembro etan historion en kiu rolis instruisto de Esperanto. La ĉapitrojn eblas spekti en la retejo <http://www.antena3.com/series/el-secreto-de-puente-viejo/>

# IBERIA RENKONTIĜO EN KATALUNIO

La Iberia Renkontiĝo temas pri ĉiujara esperantaĵo okazanta ie en Iberio kunorganizata de Portugala Esperanto-Junularo, Hispana Esperantista Junulara Societo kaj Kataluna Esperanto-Junularo. En 2014 la renkontiĝo estis organizata de ĉilasta organizaĵo, kaj ĝi okazis en L'Arboç, ĉarma urbo de Katalunio, situanta en regiono konata pro sia produktado de vino kaj ĉampano, inter la 5a kaj la 7a de septembro.

Kaj kiel suko, ĉijare oni povas mencii la lecionojn pri popolaj dancoj el la makedonia regiono, kie oni ĝuis koncertojn kiel tiu danciga de Jomo, kaj spekti la Giralda-n en la kataluna vilaĝo (nu, fakte mi tion maltrafis, la turisman programon... sed vere tie situas imitaĵo de la Giralda pro kataluno enamiĝinta al andaluza kaj li konstruis tion por hejme sentiĝi ĝin)


Alex Escobedo



**IBERIA  
RENKONTIĜO  
2014**

5an/6an/7an de septembro  
**L'Arboç (Katalunio)**





## Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!

Ekzistas multaj bonaj argumentoj por aliĝi al UEA.

Velu kun ni! Fariĝu membro aŭ re-aliĝu!

Per aliĝo al UEA vi:

- subtenas la Esperanto-movadon en multaj landoj de la mondo;
- plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado en la mondo;
- kontribuas al la kresko de la Esperanto-movado;
- helpas ĉe la kunordigo de la tutmonda agado;
- subtenas la kulturon kaj Esperanto-instruadon;
- atentigas pri la kulturaj valoroj de la movado ĉe UNO kaj UNESKO;
- helpas al internaciaj kontaktoj pere de Esperanto;
- helpas al persona kresko de E-aktivuloj (Seminario Aktivula Maturigo, AMO);
- atentigas pri graveco de lingva diverseco kaj justeco;

UEA-membreco tamen ankaŭ donas personajn avantaĝojn.

Vi ekzemple:

- apartenas al internacia komunumo;
- apartenas al prestiĝa tutmonda asocio;
- povas ricevi la revuon *Esperanto* (Membro MA);
- ricevas la Jarlibron (Membro MJ);
- ricevas rabaton por partopreni ĉe Universala Kongreso de Esperanto;
- ricevas rabaton ĉe la Libroservo;

Al ĉiu kategorio vi ankaŭ povas aliĝi rete. Tiel vi ŝparas paperon, sed havos aliron al la retaj revuoj kaj/aŭ Jarlibro (bv. menci, se vi volas rezigni pri paperaj eldonaĵoj). Eblas speciale kontribui al la evoluiĝo de la asocio fariĝante membro de Societo Zamenhof aŭ Patrono de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo *Camuto* vi solidare ebligas membriĝon al aktivaj esperantistoj el landoj malriĉaj aŭ nepagipovaj. Donacoj al regionaj aŭ temaj fondaĵoj helpas evoluigi la agadon ĉe specialaj kampoj. Ĉu demandoj?

Esporu ĉe la retpaĝo de UEA: <http://www.uea.org>

Reta aliĝilo: <http://db.uea.org/alighoj/alighilo.php>

Listo de kotizperantoj: <http://www.uea.org/alighoj/perantoj.html>

aŭ ne hezitu skribi al: [kampanjo2014@uea.org](mailto:kampanjo2014@uea.org)

Por pliaj detaloj, kontaktu kun la peranto en Hispanio: Pedro A. Garrote Escribano, c/ Las Mercedes 5-5-C, 47006 Valladolid, tel.: 983-477-179. Rete: [hisperanto.uea@terra.com](mailto:hisperanto.uea@terra.com)

# INTERLINGVISTIKAJ STUDIOJ EN POZNANO

Ĉi jare, tri hispanoj partoprenos la Interlingvistikajn studojn en Pozna. Mi konsideris oportune informi al la legantoj de Boletín, ĉar ambaŭ estas aktivuloj de E-o kaj laŭ mia opinio ambaŭ ĝuos kaj profitos la interesan kurson. Bedaŭrinde la prezoj estas tre altaj, sed finfine kun helpo de diversaj esperantistoj Fundación Esperanto kaj AEU, Fátima el Arundo Félix el Madrido kaj Suso el Vigo flugos al Pollando.

Suso Moíños naskiĝis en Vigo kaj lernis esperanton en 1986 danke al la korespondaj kursoj de Callosa de Segura, kiel multaj aliaj homoj en tiu epoko. Tuj poste li ekfrekventis la vigan grupon Paco kaj Amo, kiu vivis siajn lastajn jarojn. Li studis Galegan Filologion en la Universitato de Santiago de Compostela, kie li instruis esperanton dum du lernojaroj en la Instituto pri Lingvoj danke al Antonio Alonso Núñez. Ankaŭ en Lisbono li studis; tie li ofte ĉeestis la kunvenojn de Portugala Esperanto-Asocio. Malpli longe li vivis en Fuengirola kaj Sebto. Jarojn poste li instruis esperanton en Vigo, ĉe privataj lingvolemejoj.

En 2013, danke al Itala Esperanto-Federacio, li instruis nian lingvon dum kvar monatoj en Mazara del Vallo, Sicilio, en du mezlernejoj, dum studhoroj, al geknaboj 11-14 jaraĵ (aparte ankaŭ al plenkreskuloj).



Iom poste, en ILEI-konferenco en la Esperanto-Urbo Herzberg am Harz, Germanio, li instruis, lernis, prelegis, esploris en la granda biblioteko de la Interkultura Centro Herzberg kaj trapasis KER-ekzamenon de la nivelo C1.

Li instruadis la galegan kaj aliajn samlingvajn variantojn (la portugalian, la brazilan kaj la angolan) kaj longe laboris kiel tradukisto kaj interpretisto kun la laborlingvoj rumana, hispana kaj galega-portugala. Nuntempe li okupiĝas pri redaktado de la literaturaj temoj de la retkurso por e-instruistoj RITE, organizata de la firmao E-duKati de Katalin Kováts. En Interreto vi povas legi liajn du blogojn <http://estrelasnanoite.blogspot.com>, kun tradukoj de la esperanta literaturo en la galegan, kaj <http://esperanto-teatro.blogspot.com>. En Facebook li aŭtoras la paĝon “Ekkonu Galegion”, kun teks-

toj en la nivelo B1 de KER, kaj en lia kanalo de Youtube videblas pluraj filmoj, interalie etaj lecionoj pri prononcado. Fine, li kontribuas al la revuo *Beletra Almanako*.

Baldaŭ li estos lernanto de la postgradaj Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. La studojn li entreprenos danke al Fundación Esperanto, Esperantic Studies Foundation kaj mikromecenata monkollektado organizita de edukado.net; sen ilia decida helpo li sola ne povus fari tion. Li alfrontas la novan periodon entuziasme.

Fátima Jiménez naskiĝis kaj ankoraŭ loĝas en la andaluzia urbo Ronda, kiun en Esperanto oni kutimas nomi Arundo. Ŝi studis Socialan Laboron ĉe la Universitato de Granado kaj ŝi ja kredas, ke eblas kunigi tiun fakon kun la laborado por kaj per Esperanto.

La internacian lingvon ŝi malkovris antaŭ dek unu jaroj per Interreto tute hazarde kaj neatendite.

Ĵus ekkoninte la ekziston de tia lingvo, ŝi serĉis kelkajn kursetojn por memlernantoj kaj diligente studis ĝin dum unu monato cele de interŝanĝi bildkartojn kun alilandanoj. Tion ŝi ja sukcesis, sed iom post iom ŝi enamiĝis en la lingvon mem kaj tial ŝi daŭrigis kaj profundigis ĝian lernadon.

Nun, kiam ŝi jam ne plu kolektas bildkartojn, ĝi fariĝis ĉiutaga lingvo por komunkiĝi kun perretaj amikoj, legi beletraĵojn, instrui, verki, ktp.

Dum la lernojaroj 2005 kaj 2006 kaj ekde 2011 ĝis ĉijare ŝi instruis Esperanton pere de ĉeestaj kursoj kaj por komencantoj kaj por progresantoj. La lokoj, kie okazis tiuj kursoj, estis privata kulturcentro kaj la Municipa Oficejo por Junularo en Arundo. Ĉiuokaze ŝi estis konstante subtenata de Andaluzia Esperanto Unuiĝo, kun kiu ŝi rilatas kaj kunlaboras preskaŭ ekde ŝia esperantiĝo.

Je la jaro 2010 ŝi estis kunfondanto de Arunda Esperanto Klubo, loka sekcio ene de la regiona asocio.

Ŝi estis membro de la Loka Kongresa Komitato por la organizado kaj okazigo de la ĵus pasinta Ekongreso 2014 en Arundo, kiu estis la 73a Hispana kaj la 18a Andaluzia Kongresoj de Esperanto.

Ŝi estas membro de tradukanta skipo, kiu de antaŭ kelkaj monatoj laboras por la esperantigo de la oficiala retpaĝaro de la Turisma Oficejo de Arundo.



Plej freŝdate oni nomumis ŝin vic-prezidanto de Andaluzia Esperanto Unuiĝo.

Je pli persona flanko, ŝi amas verki en Esperanto, precipe poezion (kiun ŝi tute ne ŝatas verki en ŝia denaska lingvo!) kaj mikrofikciaĵojn.

Kaj baldaŭ, danke al Andaluzia Esperanto Unuiĝo kaj al Esperantic Studies Foundation, realiĝos ŝia partopreno en la postgradaj Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano. Si studu tiel diligente do kiel tiam, kiam ŝi nur celis interŝanĝi belajn bildkartojn!



"Félix Manuel Jiménez Lobo naskiĝis en Madrido en 1969.

Li studis Biologion kaj Kulturajn Antropologion.

Li eklaboris kiel naturmedia teknikisto kaj poste kiel profesia administranto en labor-konferato en kiu nuntempe li estas labor-partnero.

Li spertas pri Korporacia Sociala Respondeco kaj Socialaj Bilancoj kaj li estas sociala konsilanto de Coop57 (financa kooperativo) kaj "Mercado Social de Madrid" (Madrida Sociala Merkato).

Li ankaŭ agadas ĉe la hispana sociala movado "15M". Rilate al E-o, li esperantiĝis en 1997 kaj nuntempe estas Sekretario de la Estraro de HEF (ekde junio de 2008).

Li prelegis pri Ornitologio (HK 2005 kaj IRO 2007) kaj pri Socia kaj Solidara Ekonomio

(HK 2011 kaj 2014, SAT-Kongreso 2013).

Li helpis la organizantojn de kelkaj E-renkontiĝoj (Hispanaj Kongresoj 2005, 2009, 2010, 2011, 2012 kaj 2013; Iberiaj Renkontiĝoj 2007, 2010 kaj 2013; SAT-Kongreso 2013 kaj Organizis HoRo 2002 en Salamanca (Hispanio) kun HEJS.

Li estas membro de Madrida E-Liceo, UEA, SAT kaj SATEH"



Ilustra fotoĵo el la kurso (fonto: [Edukado.net](http://Edukado.net))



# PAĜOJ PRI BELETRO

## Komentoj pri la originoj de la hispana liriko


En la historio de la hispana liriko, ekzistas sorĉaj anguloj kies legado vekas en mi, ne nur la plaĉon pro la beleco de la versoj, sed ankaŭ la plezuron kiun oni sentas, kiam io ne-konata brilas subite per novaj profiloj ĝis tiam ne-perceptitaj.

Tiel okazis al mi jam antaŭ longe, kiam mi legis unuafoje la antikvajn hispanajn kanzonaron kaj romancaron, t.e. la popola poezio, poemoj de aŭtoroj grandparte anonimaj.

Tiuj poemoj, havas certan plezurigan aromon trovebla nur en la sovaĝaj floroj (permesu al mi la komparon), "la plej delikataj floroj", diris la poeto Damaso Alonso. Sendube la plej sorĉaj el la tuta poezio.

Mia surprizo estis granda, kiam okaze de miaj esploroj por studi la popolan lirikon de la 8-a ĝis la 16-a jarcentoj por dokumenti tiun fakon de mia verko "Lirikaj perloj de Al-Andalus" (eldonita en 1995), mi konstatis, ke tiu agrabla sento ne forpasis: mi ja kredis trovi en pli ol unu el tiuj versoformoj el la tri kulturoj, hispana, araba kaj hebrea, naskiĝintaj en unu el tiuj periodoj de la formiĝo de la al-andalusa liriko, la originon de tiom da poemoj tradicie kantataj aŭ recitataj de la popolo de generacio al generacio laŭlonge de jarcentoj.

Mi klarigu tuj, ke por la universitataj studentoj de mia generacio, oni instruis al ni, ke la hispana liriko havis sian komenciĝon kun la poemo de "Mio Cid", t.e. je la 12-a jarcento. Estis meritoplena tasko de pluraj fakaj sciencistoj, kiuj esplorante tra la spuroj de tiuj antikvaj ĉarmaj poemoj venis al konkludo, ke la hispana liriko naskiĝis ne kun la poemo de "Mio Cid" sed dum la regado de Abd-Allāh (Kordovo, 844-912), t.e. tri jarcentoj antaŭ, sed konvenas klarigi la temon kiel tio okazis:



Kun la veno de araboj kaj ekregado de la dinastio omaja en Iberio (la araboj nomis ĝin Al-Andalus), vekigis ĉe ni la inklino por la poezio: la emiro Abd al-Rahmān la 1-a, komencis sian regadon en la jaro 756, restarigis en sia palaco de Kordovo unu el la tradiciaj kutimoj de la omaja kortego en Bagdado aŭ Damasko, kaj tio konsistis en la starigo inter la geservistoj de sia palaco, de kantistinoj kaj poetoj, malavare pagataj de la emiro.

Tiuj kantistinoj kaj poetoj, ofte partoprenis kiel ĉefrolantoj en recitaloj okazintaj ĉe palacaj festoj. La emiro mem verkis belajn poemojn, kaj tio, evidente, influis kaj grave konkeris la spiriton de la popolo en la amo kaj plezuro de la poezii-praktikado.

En la rezidejo de la emiro, oni parolis nur la araban lingvon, ne ĉar tiu estis la lingvo de la regantoj, sed precipe, ĉar ĝi estis la lingvo plej fleksebla kaj esprimoriĉa el tiuj parolataj en tiu epoko en Al-Andalus: la lingvoj de la plej gravaj minoritatoj estis la araba, la hebrea parolata ĉe la judaj kvartaloj kaj la romanca uzata de la hispanoj, t.e. la latina en sia vulgariĝa periodo.

Post la forpaso de Abd al-Rahmān la 1-a, tiu kutimo ne nur perdiĝis, sed enradikiĝis kaj akiris fortan impulson en popolaj medioj.

Antonio Marco Botella

\*\*\*Kiel daŭrigo de tiu ĉi artikolo ni komentos en la venonta pri "La naskiĝo de du versoformoj", kie ni rakontos pri tiuj elementoj kiuj kontribuas al la naskiĝo de la hispana liriko.

## POEZIA ANGULO

### *Sippenhaft*

La 27an de Majo 1942  
la naziestron Reinhard Tristan Eugen Heydrich  
iuj teroristoj grave vundis en atenco  
ricevinta la nomon Operaco Anthropoid,  
pro kio li dolore forpasis semajnon poste.

La 9an de Junio  
kunpune  
germanaj okuppolicoj detruis la ĉeĥan vilaĝon Lidice  
en apliko de la jura principo *Sippenhaft*,  
t.e. familia kunkulpeco.

En apliko de la sama principo  
la armeo de Israelo kunkulpan Gazaon bombadas kaj invadas  
kunpune  
en Julio 2014.

Jorge Camacho



# MIAJ IMPRESOJ EN LA UK DE BONAERO

Reveninte de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Bonaero, restas en mia memoro multaj imagoj, babiladoj, kunsidoj, amikoj, konatuloj kaj novaj esperantistoj kaj pejzaĝoj ĝis nun nekonataj. Do, kiel dirite, impresoj pri la Kongreso.

Jam de la komenco ni sciis ke ĉijare la nombro de kongresanoj ne estos granda, sed surprizis al ni la kvanto de brazilanoj kiuj partoprenis la Kongreson. Kompreneble ĝi estis kongreso en la suda hemisferio, do ebleco por centraj kaj sudamerikaj homoj.

La Kongresejo estis la luksa hotelo Panamericano, situata en la centro de la urbo, en la Avenuo Carlos Pellegrini, 551, kvankam multaj programeroj okazis aliloke, kiel la Movada Foiro, okazinta sabaton la 26-an de julio en Hotelo Novotel. Tie, mi partoprenis kiel Prezidanto de Esperanta Jura Asocio, en la sama tablo de Hispana Esperanto-Federacio. Kiel dum antaŭaj jaroj, bunta aro da tabloj prezentante diversajn asociojn el pluraj landoj, montrante iliajn librojn, afiŝojn, reklamilojn ktp montris la universalecon de nia movado. Angel Arquillos, Lola, Luis kaj mi prezentis niajn varojn, mi ĉefe mian lastan libron “Eŭropa Unio paŝon post paŝo” ĵus eldonita, kaj la lastan numeron de nia revuo “Jura Tribuno Internacia”.

La sekvantan tagon, dimanĉon, je la 10-a matene okazis la solena inaŭguro, en Salono Zamenhof de teatro Metropolitan, salono ne tro komforta sed taŭga por bona nombro da personoj. Tie la Prezidanto de UEA S-ro Mark Fettes, prezentis la podianojn kaj la honorajn gastojn, kaj S-ino Barbara Pietrzak legis la salutmesaĝon de la nepo de Zamenhof.



Ege plaĉis al mi la enkonduko al kongresa temo kaj la parolado de la Prezidanto de UEA kiu komencis per versoj de Martin Fierro, kaj elstarigante la gravecon de la ĉijara kongrestemo “Ĉu la nepoj nin benos?”. Post bela muzika paŭzo far argentina junulo, kiu kantis esperantlingve kaj hispane, kaj post paroladetoj de la prezidanto de la junularo, de ILEI, de la Akademio kaj de SAT, venis, laste la salutoj de landaj reprezentantoj, salutante nome de Hispana Esperanto-Federacio, ĝia Vicprezidanto, Angel Arquillos.

Vespere, krom aliaj programeroj, okazis la bankedo, en tre bela salono, kiu donis al ni la eblecon babili kun geamikoj.

La lundon 28-an de julio, matene mi partoprenis veturadon tra la urbo, kun bona profesia gvidanto kaj bona tradukanto al Esperanto, dominikana samideano. Tiu mateno donis al ni la eblecon ĝui la urban atmosferon kaj ekkoni tiun imponan urbon ekde la Plaza de Mayo ĝis tipaj lokoj kiel Caminito (Boca kvartalo), kaj aliajn lokojn kiel Recoleta, la elegantan Palermo aŭ la moderstilan kvartalon Puerto Madero.

Tiun tagon okazis ankaŭ la Nacia Vespere en teatro Metropolitan, kaj estis varia, sed mankis al ni iun prezenton pri la tipa argentina “tango”, kiun multaj el ni atendis.

Marde, krom aliaj programeroj ĉefe pri argentina kulturo, ni okazigis nian jaran kunsidon de juristoj kun sufiĉe bona nombro da partoprenantoj. Tie ni prezentis nian agadplanon, mian libron pri Eŭropa Unio, kaj prelegis ĉijare S-ro Prof. Ivo Osibov pri mara konflikto inter Kroatio kaj Slovenio. Je la fino oni disdonis nian revuon “Jura Tribuno Internacia”, eldonita en Córdoba (Hispanio), far de s-ano José María Rodríguez.

Merkrede, ni partoprenis la tutagan ekskurson al *Colonia Sacramento* (Urugvajo), kie per ŝipo unue, kaj per tri aŭtobusoj, la nia tre bone klarigata de profesia gvidantino, ni havis okazon koni tiun urbon kun grava influo ĉu hispana ĉu portugala, kaj kie mi gustumis nekonatan manĝaĵon nomata “Chivito” konsistanta el viando kaj ovo. Oni havis ankaŭ liberan tempon por promeni antaŭ reiri per buso al la ŝipo kiu kondukis nin reen al Bonaero.



Vendrede, la Internacia Arta Vespero, okazinta en salono de hotelo Panamericano, estis mezbombkvalita, kaj bedaŭrinde la internacia koruso ĉijare ne estis multnombra. Mi nur starigos la bombkvalitan kantistinon kiu bele kantis la konatan kanton “Evita”.

Kaj tiel ni atingis la lastan tagon de la kongreso. En pli malgranda salono de teatro Metropolitan, okazis la solena Fermo de la kongreso. La Prezidanto prezentis la podianojn, kaj ĉiu respondecu- lo prezentis la agadojn dum la kongreso pri disvastigo de Esperanto, kapabligo, kaj ĉio rilatanta al AMO (aktivula maturaĝo), kaj pri socialaj eventoj, kunsidoj de la estraro, kaj de la komitato de UEA ktp.

Barbara Pietrzak legis la rezulton de belartaj konkursoj, kaj premioj al aliaj fondaĵoj. Post resu- mo pri la kongresa temo elstarigante ĉefe temojn pri zorgado de la medio kaj daŭripoveco, la Prezidanto legis la rezoluciojn de ĉi tiu UK elstarigante ke temas pri amerika kongreso, en his- panlingva urbo, vere internacia laŭ landoj (57 landoj ĉeestis la UK), kaj diversa laŭ kulturoj. Je la Fermo de la Kongreso oni kantis “La Espero”-n.

En ĉi tiu kongreso okazis multaj interesaj programeroj, kiel ĉiam, Libroservo bone funkciis, kaj mi povis prezenti mian libron, kun malmultaj ĉeestantoj, ĉar tiu evento ne estis bone anoncita, ene de la Libroservo, kie oni vendis la libron. Kiel kutime, la membroj de Societo Zamenhof havis okazon babili kaj renkontiĝi, ĉijare malpli multnombra evento ol alifoj.

Resume, vere internacia kongreso, ne multnombra, sed varia laŭ nacieco, kun granda partopreno de latinamerikaj esperantistoj, kaj kun alloga kongrestemo.



M.R. Urueña

# ESPERANTO EN LA KULTURA VIVO DE MADRIDO

*Sabaton la 28an, je la 19a horo, en la parko Martin Luther King okazos literatura aranĝo: voĉlegado de la tekstoj premiitaj en la konkurso pri rakontoj de la Festo de Sankta Johano, organizita de la asocio Los Pinos de Retiro, kaj disdono de la premioj. Partoprenos la E-poeto Miguel Fernández per deklamado kaj kantado de poemoj el sia lasta libro pri socia poezio en Esperanto. Li partoprenas ankaŭ kiel juriano en la konkurso pri rakontoj. (Esperantigo de hispanlingva anonco aperinta en la reto fine de la pasinta junio).*

La afero plej belis. Mati Montero ĉiam engaĝas min en interesajn aktivaĵojn. Mati estas unu el la luksoj de la movado en Madrido. Unu el tiuj homoj, kiuj ne nur ĝuas la kulturon, sed invitas la aliajn alveni al tia ĝuo, partopreni kaj kundividi ĝin. Kiel mi, ŝi ŝatas la popolon. Kaj, kiel mi, ŝi defendas la ideon, ke oni ne devas malaltigi la nivelon de ajna beletra mesaĝo por ke la komunaj civitanoj komprenu ĝin, sed gvidi ilin al plejaj altoj por ke ili vibru de emocio. Necesas ĉefe kredi je tio kaj agi aŭtente kaj elkore.

En 2010, Mati, kiu tiam instruis en la madrida gimnazio Elijo y Garay, invitis min rakonti, deklami kaj kanti tie la vivon kaj la versojn de Miguel Hernández. Oni tiam festis la centjaran jubileon pri la naskiĝo de la poeto de Orihuela kaj de la mondo. Kaj mi vidis min sur la podio de la aŭlo de tiu mezlernejo, antaŭ centoj da geknaboj inter 10- kaj 18-jaraj plus dek instruistoj kaj la direktoro de ĝi. Neniam antaŭe mi troviĝis antaŭ tia publiko. Vere mirinda publiko. Kaj neforgesebla travivaĵo! La geknaboj silentis kaj atentis dum mia prezento kaj fervore aplaudis post ĉiu el miaj deklamoj kaj kantadoj, jen en la hispana, jen en esperanto. La versoj de la poeto de l' popolo kaptis ilin. La sukceso estis de Hernández, kapabla ravi oldajn kaj junajn, kaj de Mati, kiu certis, ke tio eblas. Mi alportis nur mian amon al la poezio de la paŝtisto-poeto kaj mian tutan koron. Mi promesis ripeti tiun sperton.

La 27an de la pasinta aprilo, Mati aranĝis prezenton de *Poezio: armilo ŝargita per futuro*, mia komentita antologio de hispana poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia, en la internacia Junulargastejo San Fermín, de Madrido. Temas ja pri aparte interesa loko, kie pasintjare niaj gejunuloj sukcese aranĝis la esperantan Iberian Renkontiĝon. Ne nur. Ĉi-eje la pasintan junion nia plurflanka artistino Ana Manero surprizis nin ĉiujn per impona ekspozicio de pentraĵoj el sia fajna peniko. Ja la estrino de tiu centro, progresema socia aktivulino, jam de longe malfermis ĝin al la najbaroj kaj realigas tie la popolan kulturalan laboron, kiun la madridaj oficialaj instancoj devus prizorgi anstataŭ preteri.

Kaj tie, en brila dimanĉa mateno, ni faris nian prezenton sub la libera ĉielo, inter arboj kaj birdotriloj. Ekis tiel la festado de la Tago de la Libro en la Junulargastejo San Fermín. La publiko, ĉefe virinoj, sidis en rondo ĉirkaŭ ni. Mati voĉlegis en la hispana; mi deklamis kaj/aŭ kantis en Esperanto. Kiom da entuziasmo la spektantoj montris al niaj poemoj kaj kantoj! La ĉarmon de la momentoj travivitaj evidentigas jena filmeto:

[<http://www.youtube.com/watch?v=cdHSBcB5Eac>].

Ne necesus aŭskulti ĝin, sufiĉus kontempli la unuajn bildojn, la mienon de Mati kaj la mian, por palpi la korkaresan etoson, kiu nin envolvis.

Okazis poste legado de poemoj fare de virinoj, kiuj spektis nian prezenton. Belaj poemoj en la hispana, la rusa, la araba... Popola poezio en multaj lingvoj, el ĝojaj langoj. Poezio vivanta, praktikata de la komunaj homoj. Vera festo por la spirito. Amata kadro, kie mia lirikamo akiras sian plenan sencon. Iniciato ripetinda. Venontoktobre ni revenos tien por ankoraŭfoje kundividi niajn versojn kun la plej eminenta el ĉiuj eblaj publikoj: la popolo.

Fine de la pasinta junio, Mati malfermis al mi novan popolkulturan pordon, tra kiu mi eniris en same allogan realaĵon. Ĉi-okaze temis pri konkurso pri rakontoj. Ĝin aranĝis, ĉi-jare por la dua fojo, la najbar-asocio Los Pinos de Retiro. La premiojn oni aljuĝis okaze de populara kermeso aranĝita en la parko Martin Luther King, kadre de la festo de Sankta Johano, kiun la tiukvartala najbararo gajoplene aranĝas jar-post-jare. La ĵurion konsistigis kvar homoj: unu kultura aktivulo de la asocio kaj tri verkistoj: du en la hispana lingvo kaj unu, mi mem, en esperanto. Ĉi lasta fakto, inteligente kaj bele distrumpetita de Mati jam antaŭe, vekis scivolon ĉe la partoprenintoj en la konkurso kaj ĉe la tutaj festantoj. Apenaŭ ni alvenis al la parko, ni estis petataj pri intervjuo. Temis pri junaj spritaj parolistoj de la radiostacio Ágora Sol (Agoro Suno), de la 15M-movadanoj (la hispanaj indignuloj). Ili tre simpatias al Esperanto. Ĝin ili kontaktis, ĉefe, dank' al la senlaca diskoniga laboro en progresemaĵoj medioj realigata de SATeH. La rezulto spekteblas ĉe:

[<https://www.youtube.com/watch?v=F33Eui-nLzQ>].



En ĝi, mia partopreno havas lokon ekde la 15a minuto kaj 13a sekundo.

Mia sperto kiel ĵuriano sen-egalas. Kutimiĝinte al tio legi la elplumaĵojn de profesiaj verkistoj, mi ne povis imagi, kiel prozas la ordinaraj homoj. Kiel esprimas siajn sentojn la kontoristo, la tajloro, la dommastrino, la senlaborulo, la doktorino, la emerito, la meĥanikisto... post tuta labor-tago. Mi ne povis suspekti la kvanton da vero kaj da koro, kiujn ili metas en rakontadon de siaj emoj kaj amoj, de siaj ĉieloj kaj inferoj, de siaj frustriĝoj, revoj kaj aspiroj... Fojfoje kun pli da pasio ol da tekniko, sed ne malofte eĉ kun flege studitaj kaj bele aplikataj literaturaj rimedoj.

Multaj el la rakontoj ravis min. Tiel, ke jam antaŭ ol kunveni kun miaj kamaradoj de la ĵurio por la elekto de la tri plej bonaj verkoj, mi esperantigis tri el ili. La ceremonio de disdono de la premioj, en ampleksa spaco de la kermeso, estis vere ĉarma. Priaj fotoj tion spegulas multe pli bone ol vortoj. Oni pendigis medalojn al la laŭreatoj. Miaflanke, mi publike informis pri ĝis tiam ne anoncita premio. Ĝin mi konceptis dum legado de la konkursaĵoj, konstatante la kvaliton de pluraj el ili: la tri venkintaj rakontoj kaj kelkaj aliaj estos esperantigitaj kaj publikigitaj en *Boletín*, la organo de Hispana Esperanto-Federacio, se la aŭtoroj konsentas. Nu, la aŭtoroj, plie ol konsenti, eŭforiis de ĝojo. Kaj tio igis min pensi, ke tre bonus kaj al la organizantoj de ĉi literatura evento kaj al ni esperantistoj antaŭanonci en venontjaraj okazigoj de la konkurso, ke la laborojn premii-tajn ni esperantistoj tradukos en la internacian lingvon kaj publikigos sur la paĝoj de *Boletín*.

La ceremonio finiĝis per deklamado de poemoj. Unu post la alia, la premiitoj, la spektantoj, kiu ajn deziris tion fari, voĉlegis versojn. Ankaŭ Mati. Kaj ŝia patrino. Kia ĝojo! Vastigas la spiriton konстати, ke parola poezio plue popolas kaj popularas kaj onin ebrigas! En tiu animkaresa etoso –mia preferata– miaj poemoj kaj kantoj eliĝis el mia plej profunda eno naturaj kaj aŭtentaj kaj plenaj de nuancoj. La publiko manifestis sian grandan ŝaton al la sonoro de Esperanto. Kaj nia lingvo vere protagonistis en tiu kultura aranĝo sub la libera ĉielo kaj ĉe la libera popolo.

Mati, ĉu necesas vortigi, ke tiu sukceso ŝuldiĝas nur al vi? Ĉu, ke mi petas vin engaĝi min plue en tiajn vibroplenajn aktivaĵojn?



Miguel Fernández



# HISPANOJ EN ESPERANTUJO

## 87a SAT-KONGRESO KAJ

### 18aj E-RENKONTIĜOJ EN PLUEZEKO

La ĉi-jara SAT-kongreso, la 87a, okazis en la belega urbo Dinan (Bretonio, Francio), de la 9a ĝis la 16a de la pasinta aŭgusto, kun partopreno de 150 esperantistoj el pluraj landoj.

Ĉirkaŭ la ĉeftemo *Civitanoj loke konstruas ontecon* disvolviĝis prezentoj, prelegoj kaj aranĝoj. Ili alportis buntan kaj allogan akordigeblajn kun la kutimaj, sed ne pro tio malpli interesaj, labor-kunsidoj de la diversaj SAT-grupoj. Rilate al ĉi lastaj, donas plezuron observi la fluecon kaj demokratecon, per kiuj ili efektiviĝas. Tute ne hazarde, sed kiel rezulto de ĉiama praktiko enradikiĝinta en ĉi organizo. Ja la fakto, ke iu ajn, SAT-ano aŭ neSAT-ano, rajtas ne nur ĉesti la organizkcernajn debatojn, sed eĉ preni la parolon en ili, evidentiĝas la teks-bazon kaj la sintenon regantajn ĉi-medic.

Diversflanke la kongreso estis konceptita kiel pluigo de la pasintjara, okazinta en Madrido, rigardata kiel referenco kaj turnopunkto en la historio de la last-epokaj SAT-kongresoj. Kia honoro por la membroj de SATeH (SAT en Hispanio), kies trea kaj efika penado sekvigis tian sukceson! Kaj kia ĝojo konstati la simpation al SAT, kiun tiu kongreso postlasis ĉe hispanaj esperantistoj! Ĉar, kvankam, nekompreneble, al ĝi aliĝis multe malpli da hispanoj ol esperite, la partoprenintoj en ĝi kaj la scivolemuloj pro ĝia eĥo pasintaŭguste montris sin pretaj trempigi en la realon de SAT, ial ĝenerale malpli konatan ol tiu de UEA. Tiele, ĉi-jare la nombro da ĉi-latitudaj aliĝintoj al la SAT-kongreso rekordis: dudek hispanoj el ses aŭtonomaj regionoj! Hispanaj kongresanoj estis la plej multnombraj post la francaj. En la lastatempa historio de SAT, oni ne memoras ion similan.

Sed ne nur kvante, sed, ĉefe, kvalite, la hispana partopreno elstaris. Ĉe laborkunsidoj, ĉe debatoj, ĉe organizaj taskoj... Plie, niaj samlandanoj estis aplaŭditaj kiel prelegantoj, kantistoj, muzikistoj,



aktoroj... La laboron filmi la ĉefajn momentojn surprenis nia Manolo Parra, kaj pri la mastrumado de ĉio de li filmita okupiĝadas nia Liven Dek, kiu finfine –ve, ve, ve!– diverskiale ne povis veni al Dinano. Atentu do la retejojn de SAT kaj SATeH kaj la priajn sciigojn far Maria Zocato, ĉar plurajn filmetojn ĉi-rilatajn Liven poiome alŝutos reten. Fakte, li jam komencis tion fari. Vidu do, kiel, eĉ forestinte, kelkaj hispanaj esperantistoj plue kontribuas al la sukceso de la dinana SAT-kongreso.

Aliflanke, tre bona etoso. Eblis, ekzemple, danci bretonajn dancojn, jen en granda salono, jen en publika placo sub la libera ĉielo, admiru la voĉojn kaj la profesiecon de la esperanta muzik-ensemblo Kapriol', ĝui surstratajn teatraĵojn, ĉeesti teatran vesperon surbaze de bone priaktorigita monologo kaj de sprite muntita amuza komedio, *Karakalo*, en la stilo de *La venĝo de s-ro Mendoza*. Multis la ekskursoj: al Cancale kaj Saint Malo, al Léhon, al la muelejo ĉe Prat, al la cidromuzeo... Kiel bongustas la bretona cidro! Kaj kiom da neforgeseblaj noktaj babiladoj ĝi peris!

Miaflanke, mi aktive partoprenis, i.a. kiel preleganto. Krome, oni petis min aranĝi kolektivan spektaklon sur la linio de nia *Vivu la teatro!*, kiun pasintjare entuziasme akceptis la ĉeestinta SAT-anaro. Volonte mi entreprenis tiun taskon. Laŭe al mia kutima laborsistemo, surbaze de la antaŭviditaj prezentoj far kongresanoj sin proponintaj kiel aktorojn, kantistojn, deklamantojn ktp, mi verkis rakontfadenon kunligintan ĉiujn ludojn. Ĉe la prezento, mi kalkulis je la helpo de mia ĉiama sursceneja partnerino Ana Manero, kiu per siaj natura eleganteco kaj talento ravis nin ĉiujn, kiel kutime.

La spektaklon la OKK-anino pri artaj aranĝoj nomis *Pluvivu la teatro!* por substreki la ligan kun nia pasintjara *Vivu la teatro!* (2), kiu, laŭ ŝi, signis novan manieron koncepti la adiaŭan artan vesperon kaj sekvendan modelon por futuraj SAT-kongresoj. Kiel min honoras, ke tiu ideo, praktikata de ni kadre de niaj HEF-kongresoj rigardatas alpreninda!

Franciska Toubale intervjuis min por la aŭstralia Radio Melburno. Ŝin interesis diversaj aspektoj de mia antologio *Poezio: armilo ŝargita per futuro*, kiun SATeH publikigis pasintjare, kadre de la madrida SAT-kongreso, kaj de mia nova verko *Memorindaj anarkiistoj kaj anarkisma esperantismo*, kiun SATeH projektas aperigi venontaŭtune.





Tuj post la SAT-kongreso, de la 16a ĝis la 23a de aŭgusto havis lokon la 18aj E-Renkontiĝoj en Pluezeko, bretona vilaĝeto ne tre fora disde Dinano. Partoprenis ilin naŭdek homoj, inter ili, kvin hispanoj, kaj ne malmultaj idoj de ekzilitoj el la hispana enlanda milito. Kortuŝas konstati la fortan emocian ligitecon de tiuj homoj, naskiĝintaj ekster Hispanio, al nia historio kaj al nia nuno.

La renkontiĝoj orbitis ĉirkaŭ du aranĝoj, disvolvigitaj, kompreneble, en la zamenhofa lingvo: kursoj kaj atelieroj. La unuaj konsistis en instruado de Esperanto laŭ la niveloj B-1, C-2 kaj D-3, sub la gvido de francaj, ukraina, slovena kaj turka instruistoj, plus staĝo pri azia medicino far korea esperantistokuracisto. Rilate al la duaj, eblis aliĝi al atelieroj pri kanto, teatro, jogo, bretona brodado, origamio (paperfaldado), informadiko kaj poezio, gvidataj de instruistoj francaj, ukraina kaj hispana (mi

mem, kiu estis invitita por atelieri pri hispana liriko). Ĉiutagaj ekskursoj, bonaj manĝoj, interesaj artaj vesperoj kaj belega ĉirkaŭaĵo: klifoj, insuloj, lumturoj, maro nekredible lageca kaj pacdona (Atlantiko, tamen!), kadre de fola vetero duonsomera-duonvintra.

En la lasta arta vespero, kursanoj kaj atelieranoj prezentis la rezulton de sia lernado. La de mi gvidita teamo kunludis kantan-deklaman version de *Lulkantoj pri la cepo*, de Miguel Hernández, ĉerpitan el *Poezio: armilo ŝargita per futuro*, kun akompano de okcitan akordiono. La lastan strofon ni rezervis por la plej veterana atelierano, la aminda naŭdekkelkjara junulino Gaby Treanton, kiu kaptis nin ĉiujn per siaj ĉarmaj voĉo, prononco kaj intonacio:

*Traflugu la duopan  
lunon de l' brusto:  
ĝi tristas pro la cepo,  
vi sentas ĝuon.  
Kaj ne disfalu.  
De nunaj okazaĵoj  
ekstere staru.*

*Miguel Fernández*

# LA 47-a ILEI-KONFERENCO EN MONTEVIDEO

19a - 25a de julio 2014

Antaŭ la Universala Kongreso en Argentino, okazis en la urugvajna ĉefurbo Montevideo la 47-a ILEI-konferenco.



La eventon ĉeestis 75 geesperantistoj el 26 landoj. ILEI-konferencoj kutime komenciĝas per franda vespero. Ĉiu partoprenanto alportas ion el sia lando por gustumigi la aliajn. Kolektiĝis multe da frandaĵoj kaj interbabilante la homoj konatiĝis.

La solena inaŭguro okazis en la impona konstruaĵo de la Nacia Parlamentejo. En la inaŭguro ĉeestis la urbeŝtrino s-ino Ana Olivera kaj du reprezentantinoj de la regiona oficejo de Unesko en Montevideo,

unu el kiuj estis ties direktorino s-ino Lidia Brito. La ĉeestantoj bonvenigis s-ino Mireille Grosjean el Svislando, prezidantino de ILEI. Ankaŭ la urbeŝtrino kore bonvenigis nin kaj deziris al ni sukcesan laboron. Same bonvenigajn vortojn direktis al ni la direktorino de la Unesko-oficejo. Poste parolis la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kaj sekvis du mallongaj prelegoj rilataj al eventoj okazintaj antaŭ 60 jaroj. En la sama loko la ĝenerala konferenco de Unesko aprobis la unuan rezolucion favoran al Esperanto en la jaro 1954. Por ni tio estis vere grandioze kaj digne povi esti en tiu tiom signifplena historia loko dank' al la klopodoj kaj sukceso de lokaj esperantistoj sub gvidado de Sonia Risso. Poste ni havis eblecon viziti sub gvidado la parlamentejon kaj kunvenejojn de deputitoj kaj senatanoj. La granda biblioteko estis impona. Post ol forlasi la parlamentejon, ni en apuda herbejo, plantis gujavan arbon. Ĉiu aldonis al ĝi iom da tero aŭ akvumis ĝin. Apud ĝi estis malvualita memortabulo kun la jena teksto: *Esperanto - Unesko, 60 jarojn kune 1954-2014*.

La konferencaj prelegoj okazis en Ateneo ĉe la placo "Cagancha". Sur ŝtofo estis videbla la marmemblemo de ILEI. S-ro Alberto Baroccas ricevis de urugvajaj esperantistoj enkadrigitan diplomon pro sia 60-jara laboro por Esperanto. La konferencanoj eksciis pri instruado laŭ Tinĉjolibro, oni parolis pri nuntempaj tendencoj en la lingvoinstruado kun aparta atento al la rolo de teknologio, pri kultura komunikado, pri la projekto "Ceibal" - havigo de malgrandaj komputiloj por ĉiuj lernejoj por plifaciligi la lernadon ankaŭ por gepatroj, pri afrika influo en muziko kaj kulturo.

La komitato de ILEI elektis du novajn honorajn membrojn - la forpasintan profesoron Helmar Frank kaj s-ron Rob Moerbeek, kiu ĉeestis la konferencon.

Krome estis elektitaj kvar novaj landaj sekcioj en Irano, Hispanio, la Demokratia Respubliko Kongo kaj Bulgario. Oni decidis aperigi la revuon *Juna Amiko kvarfoje jare*.



Dum la nacia vespero ni ekkonis la historion de Ĉarua etno kaj spektis prezenton de folkloro danco, kantojn prezentitajn de infanoj kaj ne mankis prezentado de tango. Ankaŭ niaj talentuloj kontribuis al la posta internacia vespero kaj prezentis dancojn, spritaĵojn, deklamis poemojn, gitar-kaj pianludis, kantis. Bonega estis la bankedo en la restoracio “El Fogón” en akompano de muzika duopo. Per duetaĝa turisma buso ni trairis la urbon kun surbendigitaj esperantoklarigoj ĉe ĉiu interesa punkto.

Malgraŭ la pluva vetero ni ĝuis belan ekskurson al Punta del Este. Tie ni admiris marvirinetojn, fingrojn elstarantajn el sablo (monumento fare de ĉiliano Mario Irarrázabal), kie ni fotiĝis man-en-mane. Tre interesa konstruaĵo “Casapueblo” situata en Punta Ballena estas muzeo pri Carlos Páez Villaró. Tie oni povas admiri liajn artaĵojn.

Atenton elvokis multaj homoj promenantaj surstrate kun termoboteloj, mateujoj kun suĉiloj kaj ĉiumomente trinkantaj la mateon. Ĝi estas la plej populara nacia trinkaĵo en Urugvajo. Oni ankaŭ povis spekti vesperajn tango-dancantojn apud la ĉefstrato. Ĉiu, kiu deziris kaj scipovis havis eblecon enviciĝi kaj kundanci.

Tre interesa estis lingva festivalo antaŭ la Ateneo ĉe frekventata strato. Ni prezentis 16 lingvojn kaj disdonis varbilojn pri Esperanto. Kelkaj preterpasantoj kaptis okazon kaj scivoleme sekvis duonhorajn lecionojn. Plej grandan atenton vekis la japana kaj nepala lingvoj.

Vendrede la plejmulto de konferencanoj karavane busveturis al Colonia de Sacramento, kie ili vizitis pitoreskan urbeton enskribitan en la listo de mondaj heredaĵoj de Unesko kaj poste daŭrigis per ŝipo al Bonaero. Dum la semajno ni havis buntan programon kaj ĉiuj bone amikiĝis kaj amuziĝis dum la paŭzoj. Koran dankon al urugvajaj samideanoj, kiuj strebis al bona disvolviĝo de la konferenco en tiu-ĉi signifoplena jubilea jaro inter Esperanto kaj Unesko pro la 60-a jariĝo de la unua Rezolucio. Moralan subtenon al la konferenco esprimis ankaŭ la urugvaj prezidento s-ro José Mujica.

Liba Gabalda

# 10-A EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO

De la 6-a ĝis la 12-a de julio okazis en Rijeka (Kroatio) la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. Vere ne estis la unua fojo de mia partopreno en ĉi tiuj eŭropaj kongresoj, sed mi ne konis tiun kroatan urbon, kaj pro tio mi volis viziti tiun belan parton de la Adriatika marbordo.



La temo de la kongreso estis alloga “*Justa Eŭropo kun justaj rilatoj: malmultekosta demokratia komunikado*”, kiu ekde la inaŭgura tago, estis traktata ene de la programo.

La dimanĉon, oni disdonis la dokumentojn al la partoprenantoj kaj okazis la kroata tago, sed ni ĉeestis nur al folkloro muzikprogramo bele prezentita de folkloro grupo Zora, el Opatija, kiu prezentis al ni tipajn kantojn kaj dancojn, montrante belajn vestaĵojn de ĉiu prezentata

regiono.


Lunde okazis la solena malfermo, prezidate de D-ro Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU. Komence, soprano kantis la kroatan kaj eŭropan himnojn, ĉi lasta en Esperanto. Sekve, la prezidanto salutis la kongresanojn kaj S-ino Spomenka Štimec legis salutmesaĝon de la Alta Protektanto de la Kongreso, S-ro I. Josipovic, Prezidento de Respubliko Kroatio.

Post la saluto de lokaj kaj provincaj aŭtoritatoj kiuj partoprenis en la inaŭguro, S-ro Nikola Rašić prezentis la kongresan temon, elstarigante la gravecon de ĉiu lingvo, eĉ la propra, kiel homrajto. Esperanto perfekte funkcias kiel ponto al demokratia komunikado. Fine oni transdonis la premion Ĉigno al Kroata Esperanto-Ligo.

Kompreneble, kiel ĉiam okazas en la Kongresoj, oni devas elekti la partoprenon en kelkaj programeroj, kaj mi partoprenis la kongresteman prelegon “*Tutmondiĝo kaj lingvo*” de Prof. **Emil Heršat** en kiu la preleganto substrekis ke en la lingvoj kuŝas la fundamento de kulturoj ekde nia naskiĝo. Ni ne povas elekti nian gepatran lingvon, sed poste ni povas elekti aliajn, kaj tie oni kons-tatas la gravecon de Esperanto, nuntempe eĉ en la reto.



Marde mi prezentis mian novan libron pri Eŭropa Unio, titolita “*Eŭropa Unio, paŝon post paŝo*”, kadre de prezentado de pluraj libroj pri diversaj temoj, gvidate de **Spomenka Stimec**, kiu permesis al mi prezenti, la unuan kaj dum kvaronhoron, mian verkon. Mi kaptis la okazon ke S-ro Tuidier, respondeculo de la Esperanto Muzeo de Vieno, partoprenis la kongreson, por donaci unu el miaj ekzempleroj por tiu grava muzeo.



Alian kunsidojn ni partoprenis laŭlonge de tiu semajno, sed mi reliefigos kiel gravan la publikan kunsidon de la asembleo de EEU, en kiu oni parolis ĉefe pri la strategio por Esperanto en Eŭropa Unio.

Oni ŝanĝis parte la estraron, kaj, kiel strategioj, la Sekretario S-ro Tiŝljar antaŭvidis daŭrigi la laboron en multflanka agado por diskonigi Esperanton inter la aliaj eŭropaj lingvoj, ĉar Eŭropa Unio postulas scii du aliajn lingvojn krom la propran. Esperanto povas esti unu el tiuj lingvoj. Ankaŭ oni propagandos Esperanton per la prezentado ĉu al eŭropaj instancoj, ĉu al landaj koruso-



soj de la esperanta versio de la himno de Eŭropo (Odo al Ĝojo kun kantata parto de la 9-a simfonio de Beethoven). Ankaŭ oni prezentis plurajn projektojn rilatantaj al Esperanto kun eŭrop-uniaj planoj.

Tre bela okazo por koni Kroation estis la merkreda tuttaga ekskurso al duoninsulo **Istrio**, kiu, permesis al ni koni urbojn kiel **Pula** kun bela romia koloseo kaj granda romia influo tra la tuta urbo, **Rovinj**, ankaŭ kun romia influo, grava haveno kaj preĝejo S-ta Eŭfemio, kaj Poreč enhavanta en la plej alta parto de la urbo bizancan monaĥejon kun belaj mozaikoj. La tagmanĝo okazis plenaere en restoracio ĉirkaŭata de bela naturo.

Aliaj koncertoj okazis kiel tiu de la Zagreba Grupo Druyd kaj ankaŭ S-ro Georgo Handzlik kaj S-ro S. Pilipovic prezentis amuzan teatraĵon “Asocio de viktimoj”.

Resume, sufiĉe interesa kongreso, kie oni jam decidis ke la venonta kongresurbo estos Nitra, en Slovakio.

M. R. Urueña



# VINILKOSMO OFERTAS MAGIAN MUZIKON

La tradicia nederlanda muziko de **Kapriol'!** faras liberajn aranĝojn por dancigi la ŝatantojn de tia belsona maniero ludi ĉiajn muzikilojn. Ĉi grupo, kiu aperis en 2009 ĉe **Ĉirkele d'Arrels** en Barcelono, ĉe **KEF** en Danlando, kaj ĉe **FESTO** en Germanujo. En 2010 ĉe la Beneluksa Kongreso en Antverpeno (Belgio), ĉe la Franca-Germana Kongreso en Kaiserslautern, kaj ĉe **ARKONES** en Pollando. En 2011 sekvis tureo tra Belgio, Francio kaj Germanio, kiun organizis **EUROKKA** (Esperanto-Rok-Asocio), kaj poste tra Usono. En 2013 okazis en junio denove turneo tra Usono, kaj en aŭgusto la grupo koncertis dum la Itala Esperanto-Kongreso kaj ĉe **FESTO** en Belgio. Je la komenco de la jaro 2014 **Kapriol'!** koncertis denove en Pollando kaj en aŭgusto en Bretonio, interalie la 12an de aŭgusto ĉe la **SAT-Kongreso** en Dinan.



Mi ege rekomendas ĉi lastan KD **Kavarliriko**, el kiu vi povas aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi ĝin per la

reta diskoservo: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd120&Ing=e>

Manŭel furoras kie ajn li ludas kaj kantas tre konatajn kantojn el la tuta mondo. Mezaĝuloj kaj maljunuloj ĝuas liajn kantojn, kaj komencantoj de Esperanto povas legi la vortojn sur la ekrano. Mi konis lin kiam li aperis en 2011 dum itala kongreso kaj de tiam mi estas lia unua fano. Ĉi lasta disko prezentita dum la Universala Kongreso de Bonaero, tre sukcesis, li kantis en la teatro Metropolitan ĉe la Avenuo Corrientes kun granda sukceso, kiel kutime.



Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi la KoDiskon iru ĉe: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkk121&Ing=e>



## “Kiu semas venton...”

Se vi ŝatas tradiciajn dancmuzikojn, la grupo **Maragan** naskiĝinta en 2011, okaze de balo, decidis daŭrigi la aventuron kaj ofertas nin interesan KD-n kun 11 titoloj kaj 12 paĝa libreto. La enhavo estas tre varia kun propraj komponaĵoj kaj tekstoj. Mi tre ŝatis la aŭskultadon kaj mi rekomendas ĝin al ĉiuj kiuj amas la bonan muzikon en esperanto kun diversaj muzikinstrumentoj.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi la KoDiskon iru ĉe reta diskoservo: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkk122&Ing=e>

A. Arquillos

